SEMPRE BOM SABER ! ĈIAM BONE SCII ! 2015- 12

ĈIAM BONE SCII - simpla publikigado por informi membrojn kaj simpatiantojn de la lingvo internacia ESPERANTO, ĉefe em RS-BRAZILO, kiuj kutime ne uzas Fejsbukon por rigardi pri nuntempa Esperanta-vivo, speciale novaĵojn poŝtita ĉe **GEA-Gaŭĉa Esperanto** Asocio , **EPA-ESPERANTO PORTO ALEGRE** , **ESPERANTO RS** kaj aliajn Fejsbukpaĝojn. FAOG12@GMAIL.COM



FORPASO de la samideano SOLON FLORES SANT'ANNA (1935-2015).

Ni informas al gaŭĉa esperantistaro pri forpaso de nia samideano Solon Flores Sant'Anna.

Li estis elstara brazila esperantisto kiu multe laboris pri la disvastigado de nia kara internacia lingvo.

Li ankaŭ estis prezidanto de ESPA (Esperantista Societo de Porto Alegre) kaj dum multaj jaroj partoprenis de la estraro de GEA (Gaŭĉa Esperantisto Asocio).
La kremaci-ceremonio okazis dimanĉe matene, je la 11 horo matene, unu tago post nia Zamenhofa-Tagon kunfratiĝon. (FGomes)

Brila ZAMENHOFA-TAGO en nia urbo – Tagmanĝo ĉe la Komerca Klubo

PROGRAMO MIA AMIKO: FELIĈAN DATREVENON!

15 DE DEZEMBRO DE 2015 ADONIS SALIBA

Nia "Programo Mia Amiko" multe kreskis dum 4 jaroj. Tiu programo estas funde dediĉata al formiĝo de esperantistaro. Ĝi estis lanĉita antaŭ 4 jaroj, en la 15a de Decembro, 2011. Tiu programo ne estas simpla metodo por instruado de Esperanto. Ĝia ĉefa propono estas, krom instrui la lingvon, ankaŭ fari esperantistojn, kiuj povos fariĝi instruistoj kaj volontuloj por nia movado. Nur esperantistoj instruas Esperanton. Nur esperantistoj fakte spertas la Esperantan Kulturon. Nur esperantistoj iras al Esperantaj Kongresoj kaj laboras por la diskonigo de la lingvo tra mondo. Kial? Ĉar, nur esperantistoj sentas multe pli ol senti simplan ĝuon de lingva konado. La esperantistaro formas komunumon en internaciskala sento, ĉirkaŭ la originalaj ideoj de la kreinto de Lingvo Internacia, nia kara D-ro Zamenhof, kiu naskiĝis en tiu tago.

Nia programo PMA omaĝas hodiaŭ D-ron Zamenhof, ĉar ni sentas ke liaj originalaj sentoj ene de Esperanto-Movado, surbaze de interamikeco de la homaro, estas la nura vera celo de Esperanto. De ĝi venos la progresoj en aliajn kampojn de la homa aktiveco.

Vivu Dro Zamenhof!

Vivu Programo Mia Amiko!

Kristnako preskaŭ alvenanta kaj mi profitis la okazon por ellabori simpla kanto kiun mi donacas al miaj amikoj per esperanto .

https://youtu.be/36IPm4njC2o

Flageto - Feliĉan Kristnaskon

Simpla kanto de mi elkore farita, por ĉiuj homoj apartenantaj al mia amikaro en esperantujo .

YOUTUBE.COM

https://youtu.be/36IPm4njC20

http://komputeko.net/index_eo.php

Komputeko - prikomputila terminokolekto

KOMPUTEKO.NET

Lasta Verda Kafo de la jaro 2015.
Kun la partopreno de Paulo Esperanto el Cearao. (ruĝa ĉemizo)